

Paneo en la dissendado de nia revuo IPR

Pro la pandemio malmultas la aviadilaj flugoj. En la aviadiloj estas ne nur homoj, sed ankaŭ pakaĵoj kaj kovertoj en poŝtsakoj. Fakte estas, ke ILEI produktas *Internacian Pedagogian Revuon* kaj *Junan Amikon* en Slovakio. Pro tiu malofteco de flugoj al diversaj landoj la slovaka poŝto simple rifuzas akcepti sendaĵojn al afrikaj landoj, al landoj en Centra kaj Suda Ameriko kaj ankaŭ al kelkaj aziaj landoj kaj Aŭstralio, entute temas pri 28 landoj. ILEI konservas tiujn sendaĵojn kaj atendas pli oportunan momenton por sendi ilin. ILEI pardonpetas pro tiu paneo, pri kiu la Ligo ne respondecas.

Mireille Grosjean

Prez. de ILEI